

UDK 001(05)=089.2
 YU ISSN 0048-9557

SCIENCA REVUO

Vol.28, n-ro 1/2(123/4)
 25.04.1977.

Aperas 6-foje jare. Jarabono: 56 stelojn, 15 ned.guld., 6 us. dol., 100 jug.din.

ENHAVO:

- M. Stojanoviĉ*: Grekaj popolaj kantoj en la traduko serba
C. Stöp-Bowitz: Kial kelkfoje maraj moluskoj fariĝas venenaj
A. Wenclewski k. I. Wysocka-Wenclewska: Superrigardo je la vitaminoj
A. Š. Šakirov: Enigmo de la monta rezino, natura balzamo, mumijao
O. Stolberger: La periodo de "Sturm und Drang": J.G. Herder
D.M. Cibulevskij: Ŝanĝo de balkonoj dum la rekonstruado....
W.P. Roelofs: Eugen Wüster (Nekrologo)

GREKAJ POPOLAJ KANTOJ EN LA TRADUKO SERBA

PRELEGO EN LA INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO, ATENO 1976.

(M. STOJANOVIĈ, BEOGRAD, JUGOSLAVIO)⁺

En la scienco pri la literaturo de la balkanlandaj popoloj la plej grava momento estas la komenco de intensiva multjara studado de la folkloro sur kompara bazo, kun aparta rerigardo koncerne la resonadon de serbaj kaj modernaj grekaj popolaj kantoj en la scienca mondo de la 19-a jarcento. Se la analogeco de ĉi tiuj kantoj estas senduba, reciprokan dependecon de la temoj, kaj ilian antaŭecon, estas malfacile konstati. Oni devus por tio studadi ne nur la grekan kaj serban, sed ankaŭ ĉiujn aliajn balkanlandajn poeziojn. Estas nature ke tiuj ĉi najbaroj, vivante en similaj kondiĉoj kaj batalante kontraŭ la sama malamiko - kontraŭ la Turkoj, ili kompreneble influis unu la alian tiel ke iliaj kulturaj kaj poeziaj branĉoj samtempe ricevadis ankaŭ fremdajn greftaĵojn, kaj al aliaj donadis la siajn. Por tion esplori, oni devas koni ĉiujn ecojn de iliaj poezioj, kaj la kondiĉojn kiuj ilin vokis; ne nur iliajn politikajn ligojn, historion, sed ankaŭ ĉiujn iliajn popolajn spiritproduktojn, krom la poezio - rakontojn, proverbojn - kiuj estas ofte la samaj ĉe la Grekoj kaj Serboj, ankaŭ ĉe aliaj sudslavaj balkanlandaj popoloj.

⁺ D-ro de filologiaj sciencoj
 Balkanologia instituto de Serbia Akademio de Sciencoj kaj Artoj

KOMPARA STUDADO DE BALKANLANDAJ POPOLKANTOJ

En la pasinta jarcento, tuj post la ribeloj kontraŭ la Turkoj - ĉe la Serboj 1804., kaj ĉe la Grekoj 1821., - pluraj sciencistoj estis instigitaj kompare esplori la balkanan folkloron. Unu el inter ili estis la jugoslava slavisto Jernej Kopitar (1780-1844), la inicianto por kolektado de la serbaj popolaj kantoj. Li ankaŭ la unua ĉe la sudslavoj skribis pri la grekaj popolaj kantoj en la kolekto de la franca profesoro kaj filheleno Klod Furiel (Claude Fauriel). Kopitar du foje recenzis la eldonon de Furiel, en la revuo *Wiener Jahrbücher der Literatur* (XXX Band, 1825.p.159-277), kaj diris ke la grekaj popolaj kantoj estas vera adekvato al la serbaj. Kopitar pri tio samtempe atentigis la serban kolektanton Vuk Karaĝiĉ, konkludante: "Post kiam ni povos kompari la kantojn de la Serboj kaj Grekoj, de la Bulgaroj, Albanoj kaj Turkoj, estos eble pli certe konstati ĉu la patrujo de Orfeo influis ilin ĉiujn per sia klimato, ĉu ĉiuj kune imitadis, kaj kiu el ili povis doni la tonon, unuvorte, kiu estas la majstro, kaj kiu la metilernanto... Ni vidos ĉu Furiel, post kiam li ekkonos la serbajn kantojn, restos ĉe la opinio ke la popola poezio de la modernaj Grekoj evoluas per si mem..." Kopitar ĉi tie meditas pri la influo slava.

La simileco inter la serba kaj moderna greka popolaj poezioj estis la temo de la konata serba romanisto, literatura historiisto kaj folkloristo Miodrag Ibrovac, ĉe la kongreso de jugoslavaj folkloristoj (1957). Konigante multajn komunajn detalojn en la poezio de tiuj ĉi du najbaraj balkanlandaj popoloj profesoro Ibrovac konstatis ke unu franca profesoro de la kompara literaturo, antaŭ pli ol dekkvar jardekoj, tuj post kiam la serba kolektanto Vuk Karaĝiĉ publikigis siajn kolektojn de serbaj popolaj kantoj, havis dum vintro 1831-1832. dekonu prelegojn ĉe la antikva pariza universitato Sorbono pri la serba popola poezio kompare kun la greka. Tiu franca profesoro estis jammenciita Klod Furiel, unu el la iniciantoj de la kompara literaturo studado en Francujo.

Klod Furiel ankaŭ estas la unua eldonisto de modernaj grekaj popolaj kantoj, en du libroj, kompare: la originalon grekan kaj la

tradukon francan, kun ege riĉa komento; tio okazis en la jaroj 1824-1825, dum la batalo greka por la liberiĝo de la Turkoj. Post ioma tempo, legante en la germana traduko *Volkslieder der Serben metrisch übersetzt und historisch eingeleitet von TALVJ* (tio estas mallongigo de ŝia nomo Therese Albertine Louise von Jakob, 1797-1870; tiu ĉi traduko estis la ĉefa fonto el kiu oni poste tradukadis serbajn kantojn en la francan, anglan kaj aliajn lingvojn de la okcidenta Eŭropo), Foriel rimarkis grandan similecon inter la serba kaj greka poezioj.

La manuskripto de la prelegoj de Foriel estas gardata en la biblioteko de la franca Akademio. Ilian presigon preparis neniu alia sed la romanisto serba, profesoro Ibrovac, sub la titolo "Claude Fauriel et la fortune européenne des poésies populaires grecque et serbe. Étude d'histoire romantique suivie du Cours de Fauriel professé en Sorbonne (1831-1832)", Didier, Paris 1966. La libro havas utilan komentarion kaj la historian esploron de la serba kaj greka poezioj kaj de iliaj resonadoj en Eŭropo.

Por pli bona komprenemo de multflankaj eĥoj de tiuj du bal-kanaj poezioj, M. Ibrovac difinis la koncepton de Foriel pri la popola poezio ĝenerale kaj pri ĝiaj fontoj. Laŭ la malabundaj elementoj Klod Foriel faras solidan bazon por la pristudado de simileco de la poezio de la serba kaj greka popoloj. La kantoj kutimaj, amaj, prirakontaj (baladoj kaj romancoj), historiaj cikloj - novaj kaj la malnovaj - prezentas, laŭ Foriel, multnombrajn samajn temojn, motivojn kaj detalojn. La naturo, kreskaĵoj kaj bestoj, havas la saman rolon. Vere similaj estas ankaŭ geedzaj kaj pluv-altiraj, kompatigaj kaj rabistaj kantoj. Ekz. al la serba rabista kanto *Predrag kaj Nenad* (estas nomoj de fratoj), adekvata estas la greka klefta poemo *Du fratoj*.

KLEFTOJ KAJ ARMATOLOJ

Ĉar ni ĉi tie tuŝis la kanton el la plej multnombra klefta ciklo de la grekaj popolaj kantoj, estas bezonate pri ilidiri kelkajn vortojn pli. Nome, la grekaj popolaj kantoj kiuj ekskluzive rilatas la movadon kaj la agadon de kleftoj (sudslave: hajdukoj,

kaŝitaj batalantoj por la libero), en Grekujo sub la turkokratio estas aparta laŭtema ciklo de kantoj konataj sub la nomo *kleftaj kantoj* (greke: kléphtika tragoudia), en kiuj popola fantazio miksiĝas kun la historia realeco. La forto kaj senpero de la esprimo de rapsodo (popola kantisto), kiu nemalofte estis klefto mem, liberala inspiro kaj militista digno de la heroo (greke: palikaro), travivitaj eventoj kaj vera interpretado de historiaj okazintaĵoj en la jardekoj antaŭ kaj dum la ribela 1821. jaro - ĉio tio ĝenerale estas aspektoj, vidpunktoj, el kiuj oni studadis la modernan grekan popolan kanton koncerne la kleftojn. En tio ĉiam estis ĉeestanta la penso: ĉu la kantoj pri kleftoj estas nur poezio, aŭ ili ankaŭ estas la buŝa popola historio. La respondo, eĉ tiam kiam oni tion neglektas - perdas el la vidpunkto, povas esti nur unu - tio estas la poemo kaj la historio.

Moderna greka vorto *klephtis*, same kiel la malnova, helena - *kleptis*, laŭlitere signifas ŝtelisto, rabisto. Se oni restus ĉe la origina signifo de ĉi tiu vorto, oni povus konkludi ke la agado de la kleftoj estis nur rabistkarakterata. Tio, dume, estus malĝusta prijuĝo koncerne tion kio fakte signifas la vorto *klephtis*. Pro tio, por klarigi kiuj vere estis la kleftoj, necesas antaŭe diri kelkajn vortojn pri la armatoloj, ĉar ambaŭ estas du mallarĝe ligitaj sociaj fenomenoj, du movadoj kiujn oni povas klarigi nur en interligiteco.

En Grekujo, antaŭ la milito por la sendependeco (1821.), dum la turkokratio en Balkano, ekzistis la militservo, en moderna signifo - la milicio, por la konservado de la publika ordo, por la repuŝado de rabista agado kaj tiraneco. Tiu ĉi milicio konsistis ekskluzive el Grekoj kaj funkciis en diversaj partoj de la lando. Iliaj membroj estas konataj sub la nomo armatoloj (armatoli). En la 16-a jarcento, kiam oni fondis la armatolojn, ekzistis ĉirkaŭ dekkvin grupoj. Ĉiu grupo havis sian kapitanon, sub kies estrado estis regiono nomita *armatoliko*. La armatoloj havis aŭtonomion, fakte ili vivis en montaroj kaj portis armilaron por sia defendo.

Danke al la armatoloj, Grekujo ne tuta estis okupita de Turkoj; multaj partoj de la lando konservis la rajton je sia posedaĵo, je sia sendependeco kaj je sia leĝo. Nome, la institucio de armatoloj, kiel organizaĵo kiun permesis la Turkoj, estis kapabla

administrari en sia regiono sen interplektado de soldatoj de la paŝao.

La transiro de la pozicio de armatoloj al la pozicio de kleftoj kaj inverse estis ofta kaj rapida; pro tio oni komencis tiujn du nomojn uzi sendiference, depende de la kondiĉoj sub kiuj ili vivis kaj agadis. En multaj regionoj la vorto *armatolo* estis uzata en ambaŭ sencoj. Aliflanke, en kelkaj partoj de la lando, ekz. en Tesalio, la vorto *klefto* ne signifis nur ribelulon en montaroj, sed ankaŭ la armatolon en la paco, en lia devo de miliciano. Tiuj du postenoj distingiĝis, kiam tio estis bezonate, laŭ du epitetoj. Nome, armatolon armigitan por la konservado de la paco en sia regiono, oni nomis *malkruela klefto*, dum la armatolo ribelulo nomiĝis - *kruela klefto*.

Se kleftoj foje ekiris al montaroj ili ne plu havis certan oficrajton aŭ konstantan loĝejon. Ili moviĝis diversflanken se ekzistis bezono por iu ajn sukcesa atako, aŭ ekestis subita danĝero. Sed tamen, ĉiu roto havis propran estraron, laŭeble proksime ĉe la armatoliko, kiun ili forlasis. Tiu ĉi estraro, konata sub la nomo *limeri* (kapitanejo), ĉiam estis lokigita ĉe iu ajn malfacile alirebla loko, ekz. en fendo de la supro de montaro.

Koncerne la metodon de la klefta militado, la plej grava karakteristiko estas neekzisto de iu ajn regulo kaj taktiko. Ili atakadis sen iu ajn organizita ordo, unuope sed ĉiuflanke, trovante la rifuĝejon malantaŭ ĉiu aĵo, ekz. arbo, muro, pli granda ŝtono, aŭ malantaŭ la korpo de iu falinta malamiko. Se ili estus ĉirkaŭigitaj de ĉiuj flankoj kaj ili ne povis rifuĝi aliel ol trarompadante malamikajn vicajn, ili prenadis la glavajn, kaj kriante *ŝturmon* ili esprimadis sian malesperan kuraĝon, neeviteblan entiajn kazojn kaj tre kutiman en ilia klefta vivo.

Dum nemilitaj tagoj, la kleftoj kaj armatoloj multe da tempo dediĉadis al diversaj ekzercoj kaj vetluktoj, ĝenerale en la milita celo. La plej grava ekzerco en kiu ili aparte distingiĝis estis vetlukto en la celpafado el fusilo eksterkutime longa. La kleftoj celpafadis tiel precize ke oni pri iuj rakontis strangajn historiojn; nome, ili povis, je la distanco de ducent futoj, trafi ovon pendintan de sur fadeno. Aliaj pli lertaj kleftoj povis elpa-

fi kartoĉon el la sama distanco traigante ĝin tra ringon iom pli larĝan ol la kartoĉo mem.

La kleftoj distingiĝis ankaŭ en aliaj ekzercoj apartenantaj verŝajne al la helena agonistiko, nome konkuro. Unu el la plej gravaj estis lukto en la ĵetado de diskoj. Ofte ili ekzercis ankaŭ la saltadon en altecon. Pri la lerteco de la kleftoj en ĉi tiuj disciplinoj (resp. ekzercoj) cirkulis multaj apenaŭ kredeblaj rakontoj. Tiel oni rakontis pri Niko Caras ke li povis transsalti sep ĉevalojn vicigitajn unu apud la alia.

La plej tipa formo de kleftaj vigleco kaj kuraĝo estis la obstino per kiu ili suferis turmentadon. Ne montri la suferojn de longtempa turmentado, estis ilia devo, la demando de ilia honoro, kiel Grekoj kaj kleftoj. Oni konsideris facila turmento rompiĝon de gamboj per batoj de forĝista martelo. Tiun ĉi teruran punon la kleftoj suferis sen iuj ajn larmo kaj voĉo, sed kun spitaj vortoj eldiritaj al paŝao kaj al aliaj ekzekutistoj. Pro tia terura morto inter la kleftoj naskiĝis okaza tosto - *por la morto de kartoĉo*; per ĉi tiuj vortoj ili testadis inter si meze de la gajeco dum siaj festotagoj.

Dum vintraj tagoj la kleftoj estis devigitaj disiri kaj malsupreniri en valojn. Unue ili kaŝus sian armilaron kaj la municion en iun ajn groton aŭ fendon de ŝtonego, kaj poste ili serĉus iun ajn rifuĝejon por pasigi la vintron. Multaj kleftoj sin kaŝis en sian naskiĝan regionon ĉe amikoj kaj parencoj; la plimulto de aliaj malsupreniris al la insularo de Jonio, kie ili estis pli tranquilaj kaj sekuraj ol en aliaj partoj de Grekujo, ĉar tie ili estis sub la defendo de iu fremda lando kiu regis tiun insularon.

La admiron per kiu la kleftoj estis akceptitaj en la rifuĝejon montras la fakto ke la knaboj dum la ludado ofte dispartiĝadis en du partojn - la turkan kaj la kleftan. La kleftoj en tiu ĉi ludado retiriĝus kaj okupus la lokon kiun oni konsideris montaro, dum la alia parto - Turkoj - kaŝobservis kaj atakis ilin.

La grekajn popolajn kantojn kiuj prikantas sporadajn interesajn detalojn el la ĉiutaga vivo kaj agado de kleftoj, kunmetadis ofte kleftoj mem kiel partoprenantoj kaj atestantoj pri multaj herooj. Dume, oni scias ke la plimulton de la popolaj kantoj ĝenerale, ankaŭ tiujn ĉi pri la kleftoj kaj armatoloj, verkis blinda

guzlisto - rapsodo, kiu ege rememorigas helenajn eposajn verkistojn kaj la homeran tradicion. Malgraŭ tio, ne ĉiuj rapsodoj estis verkistoj. La plimulto el ili simple kolektadis, memoris kaj rekantadis jam verkitajn kantojn. Malmulta nombro de popolaj kantistoj al jam konata poemkolekto aldonadis siajn originale verkitajn kantojn. Oni eĉ povus akcepti la opinionon ke tiuj kantoj ne havas tiom grandan artistan valoron; sed oni ofte rimarkas ke la poezio kiel arto nature havas eĉon kaj povas, sendepende kiel ĝi estus kunmetita, trafi la celon, aŭ almenaŭ celon kiu ne estas tro malproksima. Laŭ la opinio de Klod Foriel, ni preskaŭ povus aserti ke en tiu bezono por la arto, aŭ en ĝia nekompleta apliko, kuŝas la baza beleco de ĉi tiuj poeziaĵoj de la greka popola muzo.

La epopeo greka pri la kleftoj kaj armatuloj, verkita grandparte en la jamba dekkvinsilabo, kun la cezuro post la oka silabo, inspiris ne nur la rapsodon, sed ankaŭ verkistojn kaj sciencistojn, precipe tiujn kiuj okupiĝis pri la studado de la popola verkado - folkloro pri epiraj herooj. La ĉefa virto de tiuj ĉi montaraj kantoj, el la literatura vidpunkto estas en tio ke iliaj verkistoj en si mem portis la opiniojn kaj la konscion de la herooj kies bravajfojn ili laŭdegis. Ekzistis grandega komprenemo kaj kunfluo de la animo de unu klefto kaj de popola kantisto-poeto; el tio povas okazi ke la leganto imagus poeton batalantan kiel klefton, kaj klefton kantantan kiel poeton.

LA TRADUKITAJ KANTOJ

Vi jam rimarkis ke mi iom pli da loko dediĉis al la enhavo de kantoj de la klefta ciklo. Mi konsideris tion bezonata ĝuste pro tio ĉar ni vidis ke la plimulto de la tradukoj serbaj koncernas kantojn el tiu ĉi ciklo.

En la sama 1825-a jaro, kiam aperis la kolekto de Foriel, aperis ankaŭ la rusa traduko sub la titolo *Prostonarodnye pesni nŝneŝnih Grekov* (Popolaj kantoj de la nuntempaj Grekoj), farita de Nikolao Ivanoviĉ Gnediĉ (1784-1833), klasika tradukisto de *Iliado* de Homero. La subtítulo de la traduko de Gnediĉ *Pesni kleftiĉeskie* (Kleftaj kantoj) indikas la enhavon de dekdu nure kleftaj kantoj -

Olimpo, La sonĝo de Dimo, Bukovala, Stafo, La lasta adiaŭo de klefto, La tombo de klefto, Falinta klefto, Pliasko, Andriko (Andruco), Kaljakudis, Giftakis, Skilodimos - kiujn la tradukisto elektis por la rusa leganto. El inter tiuj rusaj estas farita la unua serba traduko de nur du kleftaj kantoj: *La tombo de klefto Dimo kaj Andriko*, aperigitaj en la plej malnova serba revuo *Letopis Matice srpske* (La kroniko serba), kiun oni eĉ hodiaŭ senĉese aperigas. La tradukon faris Teodor Pavloviĉ, unu el la konstantaj kunlaborantoj de tiu ĉi kroniko.

Kial Teodor Pavloviĉ elektis traduki ĝuste tiujn du kantojn? *La tombo de klefto Dimo* estas unu el la plej famaj en la ciklo de kleftaj poemoj. Oni ĝin kantas en la tuta Grekujo, en variantoj kaj ŝanĝiĝoj kiuj indikas ĝian popolakarakteron kaj popularecon. Tiu ĉi kanto estas interesa ankaŭ pro tio ĉar prikantas maloftan ekzemplon en la klefta historio, prikantas la maljunan klefton mortantan hejme en la familio kaj en sia klefta rondo, per la naturmorto. Li ĝisvivis doni al sia nevo la voton mortigadi Turkojn. Por la Serboj, aparte, tiu ĉi kanto estas eĉ pli interesa, ĉar unu ĝia verso - *Estu malbenaj estroj kaj ĉi Nigra Georgio* - mencias la gvidanton de la revolucio Serba 1804.

La dua serben tradukita kanto estas dediĉita al Odiseo Andruco, la plej fama greka kapitano el inter armatoloj, kiu famiĝis speciale en la jaro 1821.

Kiel metrike aspektas serben tradukitaj tiuj du kantoj rilate la originalon grekan kaj la rusan tradukon de Gnediĉ? Same kiel la plimulto de kleftaj kantoj, ankaŭ tiuj du, greke estas verkitaj en jambaj dekkvinsilaboj. Gnediĉ en ambaŭ kazoj elektis dekkvinsilaban version. La serba tradukisto Pavloviĉ, eĉ pli libere, en *La tombo de klefto Dimo*, por ĉiu originala verso, uzis du: ok-silaban kaj deksilaban. La kanton *Andriko* li donis en la deksilabo - nacia verso de serbokroataj heroaj kantoj. Sed tamen, koncerne la enhavojn de la kantoj, Pavloviĉ ne tiom malproksimiĝis de la originalo.

+ + +

Kronologie sekvas la tradukoj de la mondfama serba sciencisto, slavisto Stojan Novakoviĉ. Li ne simple tradukis el la ĉeĥa, sed

ankaŭ reverkis la artikolon de V. Nebeski, *Popola poezio de Grekoj*, aperigita en la revuo de la ĉeĥa muzeo (1863., kajeroj 3. kaj 4.). Ĝian reverkon kaj la tradukon Novakoviĉ aperigis en kvin daŭrigoj en la revuo *Vila* (Feino), 1867.. Parolante unue pri la moderna greka lingvo kaj pri ĝia reformanto Adamantios Korais, Novakoviĉ vere konkludis ke elementaj ŝanĝiĝoj en la greka popola parolado ekstis jam en la klasika periodo. Multaj grekaj vortoj eĉ tiam ricevis novajn signifojn, por kelkaj nocioj la vortoj venis el aliaj fremdaj lingvoj aŭ eble la influo fremda faris ambaŭ tiujn konsekvencojn. En la samaj principoj de la moderna greka lingvo venis en la poeziojn - popolan kaj artan - metrika principo de la akcentado

Post tiel mallonga esploro pri la modernaj grekaj lingvo kaj metriko la slavisto Stojan Novakoviĉ transiris al la enhavo de la greka popola poezio. En tiu parto la plej larĝan lokon prenis eposaj kantoj, precipe tiuj pri la historiaj eventoj kaj heroaj agoj de rabistoj-kleftoj.

La plej malnova evento pri kiu la greka popolo ĝis hodiaŭ konservis kanton *La konkero de Jedrene*, okazis en la jaro 1361.. Sekvas la kanto pri *la falo de Konstantinopolo*, 1453. Ambaŭ kantojn la leganto serba havas la okazon legi en la proza traduko de Stojan Novakoviĉ, same kiel du kantojn pri la batalo de suliotoj - *La batalo en Suli* kaj *Despo*. Suliotoj estas batalantoj kontraŭ la Turkoj en la montaro Suli ne tiel malproksime de la Jonia maro kaj la urbo Parga. Sekvas du kantoj pri tiu ĉi urbo venkrite transdonita al la Turkoj (1818): *Malĝojo por Parga* kaj *Transloĝiĝo de la parganoj*.

La plimulto de historiaj kantoj prikantas la grekan ribelon kontraŭ la Turkoj (1821.). El inter ili Novakoviĉ elektis nur du: *La morto de Diako*, unu el la unuaj martiroj por la libero greka kaj *Marko Bocaris*, la plej nobla heroo el inter modernaj Grekoj. Ĉe la fino restis tradukoj de kleftaj kantoj, faritaj verŝajne laŭ la kolektoj de Foriel kaj de la germana eldonisto Arnold Pasov (1860.). Novakoviĉ tradukis nur tri kantojn el la klefta ciklo, unu pri Bukovala, alian pri Zidro, sub la titolo *Aglo kaj falko*, kaj la trian kiu prikantas la disiĝon de klefto kaj la patrino.

En la revuo *Prilozj prouĉavanju narodne poezije* (Kontribuoj al la studado de la popola poezio), unu el ĝiaj iniciantoj kaj eldonis-

toj, profesoro Radosav Medenica, en la kajero V (1938.), paĝoj 260-265, verkis la artikolon Bravulo-knabino (Delija devojka), donante por ilustro kelkajn interpretojn de unu ne tiel malofte disvastigita motivo pri la filino, fratino aŭ edzino kiu iras soldatservi alivestita kiel bravulo, anstataŭante la patron, fraton aŭ edzon. Ne alirante al la analizo de ĉi tie donitaj variantoj serbo-kroataj, albanaj kaj bulgaraj, profesoro Medenica aldonas ankaŭ la modernan grekan kanton el la kolekto de Teodoro Kind, *Neugriechische Volkslieder* (Leipzig 1848.), aperigitan sub la titolo *Mädchen als Kreiger verkleiden*. Do, la traduko serba estas farita en prozo, el la germana lingvo.

+
+ +

Se ni deziras ĉesi la paroladon pri la tradukoj faritaj nerekte el la greka lingvo, tiam ni menciuj ankoraŭ nur unu. Tio estas la jam menciita kanto *Du fratoj*, farita flanke de profesoro Miodrag Ibrovac. Li tradukis tiun kanton serben el la franca, ne el la kolekto de Foriel (Claude Fauriel, II, p. 117), sed el la kolekto de Emil Legrand (Recueil..., 1874., p. 323). La tradukisto elektis tiun ĉi varianton traduki ĝuste pro tio ĉar ĝi estas multe pli simila al la serba kanto ol tiu alia greka en la kolekto de Foriel. La serba varianto evoluas kun plena eposa digno. En la grekaj versoj tiu ĉi antikva motivo de la batalo inter proksimaj parencoj (du fratoj, Patro kaj filo), evidente ŝanĝiĝis kaj alkutiĝis al la moderna burĝa medio (okupiĝo de fratoj); unu estas komercisto revenanta el la urbo Konstantinopolo kaj portanta ormonojn kaj komercaĵojn; lin mortigas alia frato kiu intertempe fariĝis rabisto, por prirabi ĉion; poste li mortigas sin mem ekscianta ke la mortigito estas lia frato, ktp.).

Inter tiuj serbaj tradukoj faritaj nerekte el la greka estas kvar kantoj pri suliota heroo Foto Cavelas. La tradukon el la franca faris nekonata aŭtoro, fine de la pasinta jarcento, kaj publikigis ĝin en la kunteksto de la eta libro *Foto Cavelas*. Ĝin verkis la greka konsulo E. Jemenez en la *Revue des deux mondes* (1877.), de kie estas farita la traduko serba.

Antaŭ ol mi divenu la tradukiston de tiuj kvar kantoj pri la epira heroo Cavelas, necesas diri kelkajn vortojn pri suliotoj

ĝenerale. Preskaŭ en la mezo de Epiro, dekkvar mejlojn de la urbo Janjina, kuŝas la distrikto Suli, malfacile alirebla montara regiono, ĉe fonto de la rivero Aheront, kiun la modernaj Grekoj nomas Mavropotamo (Nigra rivero). Kiamaniere tiu ĉi regiono ricevis la nomon Suli? Oni opinias ke ĝi venis de la propra nomo Sulo, unu muzulmano kiu la unua tie perdis la kapon kaj per sia sango kolorigis ĝiajn grizajn ŝtonojn. Cetere, tio ne estas tiom grava kiom la demando: de kie kaj kiel la greka tribo de la sama nomo troviĝis tie? Fine de la 16-a jarcento la invado de la Turkoj estis terura. Pro tio la loĝantaro de multaj regionoj de Grekujo estis disloĝigita. Tiel, foje, malsuprenirante el diversaj epiraj partoj, multaj fuĝintoj troviĝis ĉi tie en la montbazo de Suli. Ŝajnas ke ili ĉi tie sentis sin sekuraj kaj de tie plej facile rezistos al la Turkoj. Tiu ĉi regiono ĝis tiam nekonata fariĝis momente ege fama, ĉar ĝia loĝantaro restis sendependa, memstara kaj libera. La unuaj familioj tien ĉi lokigitaj estis Zervati, Bocaris, Cavelas kaj aliaj, kiuj nomis sin sulioti. Sub la gvidado de siaj kapitanoj ili preskaŭ sendepende vivis komence de la 18-a jarcento. La Turkoj neniam povis subigi regionon Suli kaj suliojn, same kiel la jugoslavian Montenegron, ĉar la montenegrano same kiel sulio, ĉiam sendorme gardis sin kriante: "Mi estas rabisto kiu persekutas rabistojn", laŭ la vortoj de la mondfama jugoslavia poeto Njegoŝ, verkisto de *La montara krono*, eposo jam esperantigita.

+ + +

En la greka popolo ekzistas pluraj kantoj kiuj prikantas batalojn inter la sulioj kaj Ali paŝao de la urbo Janjina. En tiuj bataloj aparte famiĝis du suliotaj familioj - Bocaris kaj Cavelas; el inter ili precipe Marko Bocaris, Lambro kaj Foto Cavelas.

Nun ni revenu al la libro de Jemenez. Ĉar lian tekston samtempe uzis la serba filhelena Vojislav Raŝiĉ, por sia libro *Klefoj kaj sulioj* (1892.), en Beograd, mi opiniis ke ĝuste li (nome Raŝiĉ) estis la tradukinto de Jemenez-priskribo pri Foto Cavelas. Jen pruvoj por tio. Vojislav Raŝiĉ, naskita en la jaro 1869., meze de Serbio, en la urbo Jagodina, bone konis la francan lingvon, ĉar li studis juron en Francujo (Parizo), eĉ tie li fariĝis doktoro pri juro. Reveninte Serbion li oficis en la Ministerio de

klerigo. Estis unu el la iniciantoj de la biblioteko kiu aperigis la tradukitan tekston pri Foto Cavelas. Krom tio, ĉe la fino de sia libro *Kleftoj kaj suliotoj*, Raŝiĉ donis la fontojn por ĝia skribado. Inter aliaj estas *Revue des deux mondes*, sed ne ankaŭ la menciita serba traduko de la Jemenez-priskribo. Tio signifas ke la jaro 1892., kiam aperis la libro *Kleftoj kaj suliotoj*, estas la termino "post quem" oni aperigis la tekston pri la suliota heroo Foto Cavelas. Aparta pruvo, laŭ mi estas laŭlitere samaj tradukoj de grekaj kantoj en la priskribo de Jemenez kaj en la libro pri suliotoj de Raŝiĉ.

Unu jaron pli frue, 1891., Vojislav Raŝiĉ, vera konanto ankaŭ de la moderna greka lingvo, aperigis la antologion *El la greka literigado*, dediĉitan al ĵurfrateco de la serba kaj greka junularoj. Inter la tradukitaj kantoj de grekaj verkistoj: Rigas Fereos kaj Dionisios Solomos, de Zalokostas, de Aleksandos Rangavis kaj Aristotelo Valaoritis, la lokon trovis ankaŭ la greka popola kanto sub la nomo *Armatolo*, la unua serba traduko farita el la originalo. Sed tamen, kvankam ĝi enhave sekvas la fonton, la traduko ne estas originale verkita. Nome, la grekaj jambaj dekkvinsilaboj estas anstataŭigitaj per la serbaj deksilaboj, kompreneble nerimigitaj, same kiel la grekaj.

La saman tekston de tiu ĉi kanto pri ribelulo la leganto trovas en la komenco de la jam menciita libro de Raŝiĉ, *Kleftoj kaj suliotoj*. En tiu centpaĝa libro estas aperigitaj en la traduko serba dudek kantoj pri la kleftoj, sed ne ĉiuj estas popolaj. El inter popolaj mi analizos ĉi tie kelkajn, precipe tiujn kiuj montras al vi tradukmanieron de Vojislav Raŝiĉ. Ekz. la kanto pri Hristo Milionis, unu el la plej malnovaj kaj plej konataj kleftoj; ĝi prikantas tragikan finon de la vivo de tiu ĉi fama rabisto vivanta meze de la 18-a jarcento. La nomo Milionis, opinias Foriel, venas de la nomo de lia ege longa fusilo nomiĝanta greke *milioni*. Hristo Milionis perforte eniris la urbon Arto kaj sklavigis kadijon kun kelkaj eminentaj turkoj kiujn forkondukis en montojn. Museslimo, reprezentanto de paŝao, ordonis al la komunumestro Mavromatio kaj la dervenago (turka oficisto kiu zorgas pri grandaj trafikejoj) ke oni mortigu Hriston. Por efektiviĝi tion ili ambaŭ taskigis unu albanon, laŭnome Sulejmano, la amikon de Hristo Mili-

onis. Nekredeble, al Sulejmano ne estis malfacile mortigi la amikon, eĉ perfide vokis lin kune trinki; sed kiam Sulejmano diris al Hristo kion li devas fari, ili ekkverelis kaj batalante ili mortigis unu la alian. Tiun ĉi enhavon ni legas serbe en la dekdusilabaj versoj, kvankam ĝia originalo estas verkita dekkvinsilabe.

Sekvas la kanto *Kleftoj en Valto* tradukita en rimigitaj oksilaboj, same kiel estas verkita en la greka. Ĝia rapsodo prikantas la kolektiĝon de kleftoj en la vilaĝoj de la montara ĉeno de Agrafo.

La armatoloj de Olimpo, de tesaliaj partoj de Pindo kaj de Agrafo rezistis la invadanton kaj ofte armigitaj malsupreniris de la montaroj en valojn kaj en urbojn, atakante turkojn. Ĝuste pro tia aktiveco la armatoloj ricevadis ankaŭ la nomon kleftoj. Por ilustriti tion V. Raŝiĉ elektis traduki la kanton *Olimpo kaj Kisavo*, pri du montaroj batalantaj inter si kiu el ili kaŝas pli da kleftoj kaj armatoloj.

Nun ni lasu popolan rapsodon por ke li diru al ni kiel klefto batalas malproksime de sia domo, ne gardante sian vivon. Eĉ kiam li trovas heroan morton en tiu batalo, li ne deziras ke oni sciu pri ĝi. Jen pri tio en deksilaboj serben reverkita kanto *La lasta adiaŭo de klefto*, kiu mesaĝas ke li edziĝis en malproksima loko, kaj ke nigra tero estas lia amo.

Kleftoj vere havis siajn amatinojn kiuj ankaŭ estis kuraĝaj kiel iliaj edzoj. Pri tio ekzistas kelkaj variantoj en la klefta ciklo de grekaj kantoj. Raŝiĉ deksilabe tradukis la kanton pri edziĝo de la filo de Zidro.

+
+ +

Lige kun la ĝisnunaj serbaj tradukoj de la kleftaj kantoj mi estus tiom malmodesta diri kelkajn vortojn ankaŭ primiaj tradukoj kaj pri mia kompreno de la greka popola muzo. Kompreneble, mi ne parolos pri la kvalito de tiu mia traduko; mi tion lasas al miaj kolegoj kaj kompetentuloj. Mi ĉi tie mencios nur la kaŭzon de mia tradukado kaj la enhavon de tradukitaj kantoj. La traduko aperis en la revuo *Koraci* (Paŝoj), Kragujevac, la kajernumeroj 11-12, por la jaro 1975. Ankaŭ miaj tradukoj koncernas la kleftajn kantojn; jen ili laŭ la titoloj: *Disiĝo kun la patrino*, *Hristo Milionis*, *Andruco*,

*Armilaro de klefto, Olimpo kaj Kisavo, Kolokotronoj, x..x..x, Diamando, Falinta klefto, La mesaĝo de klefto, La lasta adiaŭo de klefto kaj Tombo de klefto. Atenta aŭskultanto jam povis rimarki ke pli ol duono de tiuj ĉi kantoj oni serben pli frue tradukis. Mi respondas - jes, sed mi per tio deziras kompare montri bonajn kaj malbonajn alirojn de la ĝisnunaj tradukistoj, precipe se tio koncernas unuflanke, la enhavan rilaton inter la greka originalo kaj la traduko serba, kaj aliflanke la eblecon sekvi metrikan sistemon de la originalo. En ĉiuj dekdu kantoj mi sekvis la grekan dekkvinsilabon kun la cezuro post la oka silabo. La saman manieron mi sekvas ankaŭ en aliaj tradukoj de grekaj popolaj kantoj antaŭviditaj por la libro *La eposo klefta*, kiun mi preparas paralele kun la monografio *Sudslavaĵ rabistoj kaj modernaj grekaj kleftoj*.*

Konklude restas al mi aparte substreki la similecon en spiritproduktoj de la balkanlandaj popoloj, precipe inter la greka kaj serba poezioj, al kies studado estos dediĉita ankaŭ tiu ĉi mia modesta kontribuo.

